

& Naiva poemeto:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 222 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1921) "je la naskotago de Zamenhof". Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Mia lingvo.>

(#Melodio:

<1,5:37> (/Mi Mi LaTi doTi Lado; TiMi MiMi MiFi So; La LalTi LaSo SoFa MiFa; SoMi MiMi ReDo Re;

(#Rekantaĵe: Mi LaLa LaTi LaSo So; Mi MiMi MiFi SoSo; MiRe ReMi Do DoRe Mi; LaLa SoSo La La a)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Blondaj, brunaj homoj junaj ; Kun ŝaŭmanta vigla sang'! ; Kantu2 ĥore, ĝojsonore ; Festan kanton via lang'!

(×: **Tretu kviete en la ĉen' ; Paŝu en vigla vico ; Dume kreskas verda arbar' ; kun radikoj vastaj.**)

'2 Kaj, grizuloj! junaj bruloj ; Revekiĝu en la sin', ; Kaj prudento, juna sento ; En vi frate miksu sin.

'3 Man' en mano, ĉiu ano ; De la frata societ', ; Faru ĉenon, datrevenon ; Festsalutu kun ridet'!

'4 Tag' de nasko! mia tasko ; Estas: krii kun fier', ; Ke donacon: sanktan Pacon ; Vi promesis por la Ter'.

'5 Hom' de Bono! per festono ; De la am' ni gloras vin, ; Hom' de Amo! ni en flamo ; Danke rememoras vin.

'6 En la lukto ĝis la frukto ; Majstro, helpu per spirit', ; Ke per veno de Kompreno ; Pacon donu pacmilit'!